# Esperanto en Danio

18-a jarkolekto • n-ro 4 • septembro 2011




UK-reklama rubando super "Strøget" (farita de N.-E. Hartmann)

**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la asocio/prezidanto:**
Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Regin Larsen
Ole Therkelsen

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 50 38 41 77 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**01.12.2011**

# Enhavo

**Novaj defioj atendas nin!.........3**
**Raportoj pri la UK.....................4**

***Fotokalvalkado de la kongresoj.................................9***

**Universitata kunlaboro inter Danio kaj Ĉinio.......................19**
**La ILEI-Konferenco................20**

**Kopenhago.............................21**
**Næstved..................................22**
**Paperaj gazeteltondaĵoj.........23**
**Postkongresa semajno..........23**

# Novaj defioj atendas nin!



La 96-a UK estas nun malantaŭ ni kaj ni povas esti fieraj ke la multaj deklaroj kiujn ni ricevis buŝe kaj skribe kiel vi povas legi en tiu ĉi numero indikas, ke granda parto de la kongresanoj estis kontentaj pri la disvolviĝo de la kongreso, malgraŭ la mizera vetero. Unu el ili, kiu cetere ĉiam partoprenas asertis, ke tiu estis la plej bona kongresu kiun ŝi spertis! Al la bona etoso larĝe kontribuis la profesia aliro de la kongresejo mem kun ĝiaj tre profesiaj teknikaĵoj, sed kompreneble forte kontribuis ankaŭ la strečoj de niaj helpantoj, ĉiam pretaj aŭskulti la dezirojn aŭ subite okazintajn problemojn de unuopuloj. Al tiuj dumsemajne fidele laborantaj helpantoj iras mia profunda danko.

Nun ni povas koncentriĝi pri venontaj defioj kaj eventoj. Krom la 97-a UK en Hanojo, venontjare ni havos la eblecon partopreni en du aliaj eŭropaj eventoj: nia jarkunveno, kiu okazos Pentekoste en Berlino en kunlaboro kun GEA kaj PEA (la germana kaj la pola landaj asocioj), kaj la 9-a kongreso de EEU – Europa Esperanto Unio en Galivo/Galway, Irlando. Aliĝiloj pri tiu lasta estas akireblaj ĉe ni.

# Raportoj pri la UK

## *Miraklo okazis*

Eĉ mi kelkfoje estis skeptikemulo pri la organizado de la UK. Eble estis unu kiu certis pri sukceso kaj tio kelkfoje surprizas. Ŝia nomo estas: Ileana Schrøder. Grandan gratulon al ŝi!

Neniu dubo ke multaj kontribuis kaj laboregis, sed bona rezulto dum la lastaj 2 semajnoj ne mankis. Mi aŭdis multajn pozitivajn komentojn koncerne la tuton, kaj la homoj de diversaj landoj miris la trankvilon kaj superecon de nia prezidantino. Unu germanino diris, ke eĉ unu rimarketon ŝi ne povas trovi. Do plena kontento el Germanio. Mi povus daŭrigi…..

Mi persone ĝuis la kongreson, suprizate ke tio eblas. Jes, mi havis miajn taskojn kiuj bone funkciis ĉar mi ŝajne trafis la guston de kunhomoj . Ho kiel mirinda okazintaĵo!

Al mi la programoj kiujn mi ĉeestis, multe plaĉis. Mi spektis du dokumentajn filmojn pri universala lingvo. Ambaŭ estis tre valoraj dokumentoj por prezenti al ne esperantistoj, sed speciale tiun anglalingvan de Usono.




Dana Ekspresе, vendrede en la salono Neergaard, okazigita de Jens Stengård Larsen plaĉis al mi multe. Kian valoran laboron mi sentis, kaj multaj homoj ĝuis ĝin.

La internacia vespero bonege glitis, ankaŭ pro tio ke ni havis nian ĉarmulon sur scenejo, Kim Henriksen kiel la bona gvidanto.

Denove estis belege renkontiĝi kun multaj konatuloj sed ankaŭ ekkoni kelkajn novajn esperantistojn. Mi sentas ke nia afero pli kaj pli havas sencon kaj valoron. Mi ankaŭ esperas ke aliaj sentas la samon.

*Ana Cumbelic-Røssum*

## *Miaj impresoj*

La 96-a Universala Kongreso estas nun parto de nia historio. 88 esperantistoj danaj aliĝis al la kongreso kaj ĉiuj havis proprajn spertojn kaj impresojn; jen miaj.

Post la solena malfermo okazis la malsolena inaŭguro junulara en la salono Friis. En la kongresa libro estis skribite: 'Laŭ la temo de la kongreso la junularo tamen invitas ĉiujn kongresanojn partopreni la programerojn por instigi plian komunikadon kaj komprenon inter la aĝ-grupoj.' Tial mi akceptis la inviton partopreni la malsolenan inaŭguron, kiun gvidis Di Ponti. Ŝi proponis al la ĉeestantoj ke ili proponu temojn por la kunvenoj junularaj dum la kongreso. Do mi kaptis la ŝancon kaj proponis la temon 'Kiel ni konstruos intergeneracian ponton?'

Kunvenis proksimume 18 personoj diversaĝaj. Bone estis, ke kvarono el ni estis danoj, ĉar la temo estas ja defio por ni. Malferme ni parolis pri niaj sintenoj rilate al Esperanto, la movado, la intergeneraciaj diferencoj kaj ĉies frustracioj. Venis proponoj pri projekt-orientotaj vesperoj en la klubo; filmgrupo, konversacia grupo, klubaj renkontiĝoj ekster la kulturdomo ktp. Horo ne sufiĉis por konstrui ian ajn ponton, tamen ni konsentis, ke ni daŭre pridiskutu la aferon. Espereble multaj el vi kaptos la ŝancon partopreni la konversacian rondon en KEK la 12-an de septembro, kiam ni priparolos la temon: 'Kien ni iru?'

Krom koncertoj de profesiaj muzikistoj estis koncerto de la Internacia Koruso. Trideko da kantantoj el dudeko da landoj post kvar provludoj koncertis kantante dek kantojn. Estis laŭ mi (kiel unu el la kantantoj) unu el la miraklaj atingoj modestaj de la kongreso. Du el la kantoj elektitaj estis 'Ridetas dolĉa la dana bord'' (Johs.V. Jensen) kaj 'Kantoplenas nun la tag'' (Jeppe Aakjær kaj Carl Nielsen), ambaŭ tradukitaj de Poul Thorsen. Aliaj kantoj estis 'Vizaĝon supren' kaj 'Sed ŝvelos nia esper'' el Japanio, 'Rozeto en Herbejo' el Germanio, 'Kara Bara Wira Kana' el Aŭstralio, la

jubilea kanto – ‘Signo de l’Esper’’, ‘Dancu, dancu’ el Ĉeĥio, ‘Esperanta Lando’ kaj ‘Jen nia mondo’. Gratulegojn al Alan Bishop nia korusestro pro lia efika sed malstreĉa gvidado.

Unu el la plej oftaj konversaciaj temoj estis la vetero, kiu skurĝis la tutan semajnon escepte de la ekskursa tago, merkredo. Tamen eĉ la malbela vetero ne sukcesis detrui la bonan etoson. Multaj reagoj jam venis; kelkaj el la reagantoj kontentiĝis pri la bonega programo kaj la helpemeco de la aranĝantoj. Kelkaj grumblis pri ‘malglataĵoj’ kaj pri la tro granda disvistiĝo de la angla en Danio. Kion ni faru? Eĉ idealismaj esperantistoj estas nur homoj, kaj Utopio ne jam troviĝas!



*Ĉiuj artistoj sur la scenejo por la fina numero*

## *Neniu embarasiĝo*

Ni decidis pri nia ĉeesto en la 96a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhagolastminute, sed kaptis la ŝancon aĉeti biletojn por la lasta ordinara tago.

Nia celo: renkonti novajn kaj malnovajn amikojn. Kaj kompreneble ĉeesti la Internacian artan vesperon.

Mi volas gratuli Kopenhagon pro la plej bona kaj altkvalita IAV kiun mi iam ajn ĉeestis. Do, mi nur ĉeestis tri antaŭajn, sed tamen, ege bona! La variado (mallongaj programeroj kun tutmonda dancado kaj diversstila muziko), la kvalito (mi ne eĉ ajne embarasiĝis), la finalo (ĉiuj artistoj kantis Sola sub gvidado de Kim Henriksen).

*El la blogo parelie.wordpress.com de Julie Parelie Abrahamsen*

## *Dankon al vi ĉiuj, danaj samideanoj*



Estimataj/karaj gesamideanoj en Danio,

Saluton. Jam estas 10.20 nokte kaj morgaŭ matene mi veturos al la flughaveno. Eble morgaŭ matene mi ne havos tempon por skribi al vi.

Mia restado en Kopenhago ja estis agrabla. Mi ne havas aliaj pli belajn vortojn por esprimi mian ĝojon.

Mi sincere dankas vin por via helpo, subteno, promeso kaj kuraĝigo por min vizitigi tiun ekzotikan landon. Sen via laboro, helpo kaj deziro, mi ne povus estis tie ĉi.

Mi gratulas vin por la sukcesa kongreso. Ĝi fariĝis pli sukcesa ol imago de multaj homoj. Mi gratulas vin ĉiujn por via bona laboro.

Mi ja deziris rendevuon kun kelkaj de vi post la kongreso. Sed mi ja ne povis fari tion ĉar vi estas okupitaj kaj mi ankaŭ ne bone havas scion pri la urbo. Mi petas pardonon por tio kaj mi volonte estos en kontakto kun vi per la reto.

Mi precipe dankas al s-ro Peter Wraae, kiu gastigis min dum pluraj tagoj, veturigis min en lia aŭto kaj ankaŭ donis al mi bojan danajn manĝaĵojn. Mia memoro pri tiu ĉi vizito, gastiĝo kaj lia gastigamo estos en mia koro dum estos Esperanto en mia kapo.

*Razen Manandhar*

## *Agrablaj restadoj*

Kara Ileana Schrøder,

jam pasis du semajnoj post la fermo de la UK, kaj estas tempo, ke mi fine danku vin kaj esprimu mian kontenton pri la bela kongreso. Ĝi restos simile neforgesebla kiel mia unua vojaĝo al Kopenhago antaŭ pli ol 42 jaroj, kiu fakte estis mia mielvojaĝo.

*Ulrich Lins*

## *Gratulojn kaj dankojn*

Karaj,
iu tuj alparolis nin kaj klarigis pri la vivo en la Universitato
iu el vi veturigis nin al la studenta domo ... kun la pakaĵoj
iu proviziis nin per “klip-kartoj”
iu ĉiĉeronis laŭ la Kanalo kaj tra la urbo
iu ĉiĉeronis al Roskilde kaj al la muzeo
iu muzikumis
iu prezentis la danan lingvon
iu respondis al la demandoj ...
kia bona teamo !
mi tre dankas kaj gratulas vin pro via sindonemo dum 2 semajnoj
Bonvenon al nia lando ...iam, mi estas en Pasporta Servo apud Gap !

*Monique Arnaud*

## *Bona alveno*

La 96-a UK en Kopenhago kvankam multekosta akiris interesiĝon de multaj esperantistoj kaj turistoj. Internacia Klubo Esperantotur en Bydgoszcz – Pollando proponis entute 26 vojaĝvariantojn tra 12 landoj de norda Eŭropo. Finfine realiĝis 12 vojaĝvariantoj tra 12 landoj kun esperantistoj el 9 landoj: Brazilo, Bulgario, Francio, Finnlando, Latvio, Litovio, Rusio, Svedio kaj Pollando. Entute pli ol 80 personoj vojaĝis per du busoj kaj ses aviadiloj por partopreni la 96-an UK en Kopenhago kaj realigi la internaciajn vojaĝprogramojn al kio precipe helpis jenaj esperantistoj: Jerzy Dryja en Varsovio, Walentyna Fiszer-Dolinska en Bjalistoko, Regina Grzebowska en Litovio, Mara Timermane en Latvio, Anna Butkievicz en Rusio, Carola Antskog en Finnlando, Kerstin Rhodin en Svedio kaj Stanislavo Rybarczyk en Danio. Organiza kunordigado de tiuj 12 vojaĝvariantoj estis komplika organiza tasko, kiun tamen sukcese solvis Esperantotur surbaze de siaj spertoj de pli ol 40-jara turisma Esperanto-agado en la mondo. Ni ĝojas ke tion ankaŭ rimarkis Estraro de Universala Esperanto Asocio kaj dum la Fermo de la UK inter 12 Esperanto-aktivulojn honorigis ankaŭ per diplomo la prezidanton de Internacia Klubo Esperantotur – s-ron Andrzej Grzebowski pro lia agado por turismo kaj edukado de studentoj pri turismo kaj kulturo.

*Internacia Klubo "ESPERANTOTUR", Bydgoszcz*

# Fotokalvalkado de la kongresoj



*Du indonezianinoj prezentas tradician dancon*
*en la ILEI-konferenco.*



*La ILEI-konferencanoj kune dancas en la universitata koridoro.*



*La Universala Kongreso komenciĝis per Movada Foiro,*
*kiu okazis en la granda halo de la Bella-Centro.*




*Jen Rasmus varbanta en la foiro por la junulara ekskurso*
*okazonta merkrede.*




*Danaj kaj Esperanta flagoj antaŭ la kongresejo.*



*La enir-halo. Fone la akceptejo. Pro fajrobrigada postulo, oni ne povis havi la grandan flagon en salono Zamenhof.*



*Festparolas en la inaŭguro s-ino Pernille Fenger,*
*ĉefo de la Nordia Oficejo de la UN-Fonduso pri Loĝantaro (UNFPA).*



*Interpretas la prezidantino de LKK, Ileana Schrøder.*



*La gronlanda koruso "Aavaat" kantis por ni en la nacia vespero.*



*Merkrede Esperanto Desperado publike koncertis*
*ĉe la kulturdomo de Islands Brygge.*




*Neil Blonstein (maldekstre) kaj aliaj "farandolantoj" marŝas tra "Strøget" reklamante por Esperanto.*



*Unu el nombro da koncertoj: la popularaj Ĵomart kaj Nataŝa.*




*Urbestrino pri kulturo Pia Allerslev*
*kun Ileana Schrøder.*



*Akcepto de invititoj en la urbodomo.*



*La itala bando kun franca nomo "Rêverie" muzike revigis nin.*




*DVD-kovrilo de la usona filmo montrita en UK.*



*En la solena fermo, ĉiu kunlaborinto ricevis rozon.*



*Jen la kongresa flago estas solene transdonata al Hanojo.*



*La partoprenintoj de la Infana Kongreseto kantis por ni.*



*La plej juna kongresano ankaŭ volis iri sur la scenejon okaze de la solena fermo.*

# Universitata kunlaboro inter Danio kaj Ĉinio



La ideo de interuniversitata kunlaboro ekestis, kiam la profesorino de Esperanto Yu Jinchao de la Ĉina Komunikada Universitato informis la estraron pri la konferenco kaj simpozio de ILEI okazonta en Kopenhago, 17-23a de julio en la Humanistika Fakultato de Kopenhago, kiun ŝi mem partoprenis. Tio koincidis kun la iamaj planoj de la ĉina universitato establi kunlaboron ankaŭ kun la Universitato de Kopenhago, krom la jam atingita kunlaboro kun la Universitato de Upsalo en Svedio. Mi mem kaj Radojica Petrovic helpis fiksi la kunvenon.

Rezulte, la 17an de junio, en la Departamento pri Komunikiloj, Kognado kaj Komunikado de la Humanistika Fakultato en Kopenhago okazis kunveno de sep-membra delegacio de ĉinaj profesoroj, gvidata de la rektoro de la Universitato pri Komunikado de Beijing kun profesoro Karsten Fledelius, la ĉefa subtenanto kaj organizanto de la konferenco kaj simpozio de ILEI.

Oni interkonsentis pri interŝanĝo de studentoj kaj instru-vizito de Karsten Fledelius en januaro 2012. Ankaŭ mi ricevis inviton viziti la Ĉinan Komunikadan Universitaton.

*Ileana Schrøder*

# La ILEI-Konferenco



Sukcese venis al fino la 44a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu elstaris kvante (103 aliĝintoj), kvalite (ĉ. 50 prelegoj, prezentaĵoj, diskutforumoj kaj laborgrupoj) kaj bunte – partoprenintoj ekzemple el Brazilo, Japanio, Indonezio, Nepalo, Ĉinio, Korea Respubliko, Ganao, Benino, Meksiko kaj Kubo.

La Komitato kompletigis la estraron per elekto de s-ro Huang Yin Bao (Trezoro) al la sekretaria posteno, akceptis sekcion el Meksiko, reprezentanton en Ganao kaj kontaktpersonojn en Indonezio kaj Nepalo.

Kulmino de la semajno estis Simpozio organizita kune kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kaj la Fakultato de Humanistiko de la Universitato de Kopenhago kun la temo: "Lingvoj de scienca komunikado kaj edukado." La simpozio disvolviĝis en la angla kaj Esperanto kun prezentaĵoj de gastoj el la akademia mondo: Frans Gregersen, Robert Phillipson, Lászlo Marácz kaj Karsten Fledelius. Aldoniĝis universitatanoj kiuj estas esperantistoj: Humphrey Tonkin, Probal Dasgupta, Sabine Fiedler, Mark Fettes, Nicolau Dols Salas, Davide Astori, Amri Wandel kaj Marek Blahus.

La debatoj malfermis terenojn kiuj devas ĉiam pli gravi por ILEI – demandoj pri lingvo-uzo kaj lingva elekteblo en transnaciaj edukaj kaj sciencaj interŝanĝoj. La realigo de la simpozio atestas mult-monatan organizan laboron flanke de ILEI kaj mult-jaran flegadon de kontaktoj en universitataj rondoj.

*Stefan MacGill, Prezidanto de ILEI*

# Kopenhago

Mathias Dalmose respondecos pri la junularaj vesperoj, kiuj estos kompreneble ankaŭ por aliaj membroj.

Betty Chatterjee respondecos pri la studgrupoj.

Jens S. Larsen respondecos pri verkada grupo, kiu povos kunveni du aŭ tri foje aŭtune. Eble ili pretus verki artikolojn ktp por Esperanto en Danio.

KEK-aj kunvenoj komenciĝos je la 19-a kaj finiĝos je la 21-a. La adreso estas: Tomgårdsvej 35, 2400 København NV. Cetere la kluba programo legeblas ne nur ĉe www.agado.net sed ankaŭ ĉi tie: https://www.facebook.com/group.php?gid=282186616591

**La aŭtuna programo 2011**

La 3-a & la 4- a septembro. Internaciaj Tagoj en Kopenhago.

> Laŭ tradicio KEK kontribuos per budo kaj ĉi-jare Esperanto Desperado (http://www.esperantodesperado.dk/) muzikos. Ni prezentos ĉe la budo kelkajn fulmkursetojn de Esperanto.
>
> Pro la konstrua kaoso en Nørrebrogade la aranĝo okazos apude en Rantzausgade, Nørrebro. Ni bezonos helpon, do bonvolu kontakti nin, se vi povos deĵori sabate aŭ dimanĉe.

La 5-a de septembro. Lene kaj Jan Niemann prelegos pri Feroaj Insuloj, kiujn ili vizitis en majo 2010.

La 12-a de septembro. Konversacia Rondo. 'Kien ni iru?'

La 19-a de septembro. Studgrupo. Marvirinstrato. 'Meduzet', p. 161-168

La 26-a de sept. Junulara vespero. Kio estas arto? Mathias Dalmose volus priparoli la temon, kaj proponas, ke ĉiuj kiuj volos, prezentu sian ideon pri tio. Oni montru ŝatatan artaĵon kaj klarigu, kial tio estas bona arto.

La 3-a de oktobro. Prelego. Amir prelegos pri la kulturo de sia naskiĝlando Bosnio.

La 10-a de oktobro. Konversacia Rondo. Ĉu vi aĉetis noveldonitan libron dum la kongreso? Ĉu vi jam legis ĝin? Ĉu la libro estis leginda aŭ ne leginda? Venu rakonti al ni pri ĝi. Eventuale vian recenzon vi povos oferti al nia revuo Esperanto en Danio.

La 17-a de oktobro. Esperanto-domo vespero.

La 24-a de oktobro. Studgrupo. Marvirinstrato. ‘El la taglibro de la okcidenta vojaĝo’,  p.169–176.

La 31-a de oktobro. Junulara vespero.

La 7-a de novembro. Prelego. Nepalo. Peter Wraae.

La 14-a de novembro. Konversacia Rondo.

La 21-a de novembro. Studgrupo.

La 28-a de novembro. Junulara vespero.

La 5-a de decembro. Prelego.

La 11-a de decembro. Zamenhofa festo.

## Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111. Pri komenciĝo-horoj bonvolu vidi ĉe la koncernaj datoj. Rigardu ankaŭ la hejmpaĝon: www.esperanto-i-naestved.dk

***Okazos:***
Kiel antaŭe anoncite, ni ek de la aŭtuna sezono 2011 kunvenos **mardojn**.
Ma 20.09 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 42 de Faktoj kaj Fantazioj + konversacio.
Ma 04.10 je h 19.30: Danlingva prelego. Hernan Gonzalez rakontos pri la ekspozicio Handi-Art.
Ma 25.10 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 43 + konversacio.
Ma 08.11 je h 19.30: Danlingva prelego. Lene Nielsen rakontos pri la art-lernejo Herman.
Ma 22.11 je h 14.00: Studgrupo. Ĉapitro 45 + konversacio. (Rim: Ni ne pritraktos ĉap 44).
Ma 13.12 je h 14.00: Jularanĝo kun glogo kaj benjetoj + komuna ujutno.

***Okazis:***
Somera ekskurso la 20an de aŭgusto per trajno al Odense, kie Liss-Lotte atendis nin kaj gvidis nin aŭtobuse al la Fuena Vilaĝo (Den fynske Landsby). Tie ni trarigardis la interesajn malnovajn bienojn, manĝis kunportitan lunĉon kaj cetere pasigis agrablan tempon en bela suna vetero.

Poste ni iris al la centro de Odense, kie estis abundo da floroj en granda florfestivalo. Ni finis la Odense-viziton per bongusta manĝaĵo en la hejmo de Liss-Lotte. Sataj de impresoj kaj manĝado ni revenis al niaj hejmoj kun impreso de tre agrabla kaj enhavoriĉa ekskurso.

## Paperaj gazeteltondaĵoj

06.2011 Jernbanefritid n-ro 5: Nyt fra esperantoforeningen 26.06.2011 Politiken: Krucvortenigmo

29.07.2011 Berlingske, Kultur: Intervjuo kun Ileana Schrøder

29.07.2011 Frederiksborg Amts Avis: Infankongreso en Hundested

02.08.2011 Amager Bladet: Intervjuo kun Kim J. Henriksen

08.2011 Hjemmet: Krucvortenigmo

09.08.2011 Ugebladet Næstved: Asocia registro

10.08.2011 Roskilde Avis: Rakontas pri vizito en Roskilde de tri germanaj esperantistoj partoprenintaj en UK

Cetere radioelsendo en P1 kaj televidelsendo en TV2 Lorry.

Krome la programbroŝuro de la ekspozicio *Handi-Art* en Næstved 24.-26.08.2011 havas enmetaĵon kun la programo en lingvoj franca kaj Esperanto.

Daŭre sendu ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

## Postkongresa semajno

Post la 96-a UK en Bella Center, Kopenhago, estis postkongresa semajno inter 30-a julio kaj 6-a de aŭgusto en Martinus Center, Klintvej 69, 4500 Nykøbing Sj.

Danaj, svedaj kaj anglaj prelegoj pri la Kosmologi de Martinus estis interpretataj esperanten de Jonas Dalmose kaj Mathias Dalmose. Du foje tage Ole Therkelsen prelegis kaj insturis pri la kosmologio. Vespere estis prelego aŭ distra programo.

Partoprenis 15 esperantistoj el 8 diversaj landoj: Rumanio, Hispanio, Usono, Rusio, Litovio, Svedio, Norvegio kaj Danio.

*Ole Therkelsen*

# NI DEZIRAS PLEZUROPLENAN *MEMFID-KAPTADON*

www.selvtillidsloven.dk

Esperanto

**Fidu pri vi mem**

**Fidu, ke vi kapablas je io**

**Fidu, ke vi estas same valora kiel aliaj**

**Fidu, ke vi estas same saĝa kiel aliaj**

**Fidu, ke neniu estas pli bona ol aliaj**

**Fidu, ke vi mem scias la plej multon pri viaj propraj problemoj**

**Fidu, ke aliaj ne ĉiam scias pli ol vi**

**Ridu kune kun aliaj**

**Fidu, ke oni ne povus malhavi vin**

**Fidu, ke ĉiu povas lerni ion de aliaj**

Ĉi-tien enmetu belan foton de vi mem.

## MEMFIDO

En tempo, kiam terurege multaj gejunuloj en la tuta mondo estas senlaboraj, grave estas doni al ili la ilojn, per kiuj ili povos krei pli bonan ekzistadon. La socioj postulas kaj rekompencas iniciatojn, memstarecon, malfermitecon kaj memfidon, kaj tio validadas la tutan vivon, ĉu por antaŭlernejantoj, ĉu por ŝtatsministroj. La penso pri la komuneco, la valoro de la kontribuo de la unuopulo al la tuto kaj la neceso senti sin bezonata kaj bonvena same estas ecoj postulataj, se oni intencas krei integrajn homojn.

Memfido estas bona ilo kaj bazo por multkultura dialogo – por paroli kun la alia, ne pri la alia. Ĉiuj homoj estas gravaj, do ĉiuj, kiuj estas 'izolitaj' pro diversaj kaŭzoj bezonas reakiri sian memfidon.

Vojoj al Memfido insistas tiel same pri la memfido de la individuo kiel pri la valoro por aliaj.

*Stig Elliot Nyegaard*

Tekst og idéudvikling: Stig Elliot Nyegaard · Lay-out: www.ludvig.dk